# ATEISMO

ESPERANTO

Organo de ATEO

## ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

Januaro, 1989

Vol. 1, N-ro 2

Eldonita Trifoje Jare

# LA CELOJ DE ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTISTA-ORGANIZO

1. *Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.*

2. *Disvastigi Esperanton inter ateistoj.*

3. *Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.*

4. *Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.*

5. *Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.*

6. *Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.*

7. *Malkateni la mensojn!*

# ENHAVO

**De la Ĉef-Redaktoro kaj Prezidanto** . . . . . . . . . . . . . . 2
Komentario pri ATEO

**Dio kaj la Ŝtato,** de Mikaelo Bakunin . . . . . . . . . . . . . . . 5
Esperantigita, el angla traduko, de Ralph Dumain

**Dio kaj Holokaŭsto,** de Adolph Grünbaum . . . . . . . . . . . 8
Tradukita de Ludisto Mirinda

**Religio en la Lerneja Sistemo de Britio,** de Peter A. Danning . 9
Eble ĝi generis nekredon

**Kelkaj Komentoj pri Religio en Pollando,** de Anonimulo . . . 10
Ateistoj baraktas en religia societo

**El nia Leterkesto** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Legantoj skribas kaj ĉef-redaktoro respondas

**Mia Dio,** de Robert Long, tradukita de Rejna de Jong . . . . 17
Daŭrigo de lasta numero: komentoj de legantoj

**Letero de Humanismo,** de Andreo Ŝalamon . . . . . . . . . . 18
Daŭrigo de lasta numero: Israela ateisto diskutas humanismon

**Statuto de ATEO** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 19
Prezentita al UEA por faka rango

**Resumo de Adresaro je Januaro, 1989** . . . . . . . . . . . . . . 20
ATEO kreskis 50% de Julio, 1988

## De la Ĉef-Redaktoro kaj Prezidanto

El la fundo de mia koro, mi dankas ĉiun el vi pro via partopreno en ATEO kaj ĝiaj publikaĵoj. Ni faras ion aktualecan, epokfaran, kaj avangardan en la kultura evoluo de Esperantujo, kaj viaj varmaj leteroj de subteno instigas min al senlaca laboro por Esperanto. Por la unua fojo (memoru ke mi estas Usonano) mi sentas ke Esperanto vere utilas al mi; mi interrilatas kaj interŝanĝas informojn kun vere inteligentaj homoj kiujn mi ne povus ekkoni per la angla lingvo. Kompreneble, mi ofte esprimas min kolere kaj negative, sed plejparte inspiras min pozitiva vizio pri la apenaŭ ekekspluatita potencialo de Esperanto.

Ekzistis iam kelkaj Esperantistaj ateismaj/liberpensulaj organizoj, pri kiuj ni rakontos estonte, sed ATEO estas vere pioniro. Tutmonda sendependa organizo, uzo de la vorto "ateismo" anstataŭ "liberpensismo" en nomoj de nia asocio kaj revuo - jen revolucia afero en la historio de Esperanto kaj la mondo. Esperantujo sojlas ĉe nova kultura etapo; ekzemple pripensu la alvokon de A. Fjodorov en lastatempa numero de Esperanto por nova kultura movado en Esperantujo. Io neplenumita kaj ekscita naskiĝas en Esperantujo, kaj ATEO estas en la avangardo klopodante krei pli profundan, kleran, seriozan, kvalithavan Esperantan kulturon!

Estas senprecedenca afero ankaŭ por Usono. Usonanoj multe kontribuis and kontribuas al subteno de Esperanto, al organiza laboro, al Esperantologiaj kaj interlingvistikaj laboroj, sed ni ne kontribuis sufiĉe al originala Esperanto-kulturo, kaj nun ni povas ekfieri.

Post nia dua bulteno ni ricevis multegajn stimulajn leterojn, enketojn, eĉ kelkajn artikolojn kaj mondonacojn. Nia membraro kreskis de 120 personaj el 26 landoj de julio 1988, al 191 personoj el 33 landoj ĝis Januaro 1989 (vidu paĝon 20). Des pli bone, ni pli enpenetras Latinamerikon kaj Azion.

Bedaŭrinde, mankas homoj de la islamaj landoj, multaj gravaj Aziaj landoj mankas en nia adresaro, kaj Afriko estas apenaŭ reprezentata. La estraro klopodas antaŭenigi ATEOn en la tria mondo. Ges-roj Massen jam klopodas pri Hindio kaj mi pri Afriko.

Mi klopodas persone respondi al ĉiu letero kaj enketo. Ni jam gajnis tiom da membroj, ke mi ne kapablas persone korespondi kun ĉiu. Plejparte, mi persone respondas leterojn (post la unua enketletero) kiam estas specifa temo diskutenda. Mi volonte korespondas kun vi kiam aperas specifa temo aŭ komuna intereso, sed kutime mi ne povas fidele korespondi. Mi klopodas respondi leterojn senprokraste, sed tio iĝas pli kaj pli malfacila pro kresko de nia membraro. Bonvolu esti komprenema kaj pacienca.

Bonvolu zorgi pri via manskribaĵo, aparte viaj adresoj. Fremdaj adresoj estas jam malfacile kompreneblaj miaflanke; kiam vi malklare skribas, mi ne povas legi do fuŝas la adresojn. Kelkfoje mi ricevas leterojn, eĉ longajn, kiujn mi tute ne povas legi. Se via familia nomo antaŭas vian personan nomon (kiel okazas ekz. en Ĉinio), bonvolu skribi vian familian nomon majuskle. Por eviti embarason miaflanke, uzu titolon "D-ro", "Prof-o", "K-do", ktp., au indiku vian sekson per "S-ro", "S-ino", "F-ino", ktp. Kompaton al mi!

Kelkaj el vi serĉas korespon-

dantojn. Se vi serĉas specife ateistojn, mi enmetos anoncojn en nia revuo. Se vi deziras korespondantojn el Usono ajnajn aŭ pri aliaj interesoj, mi povas enmeti anoncojn en la Bulteno de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono. Bonvolu mencii en viaj korespondpetoj kiel mi traktu vian korespondpeton.

Se vi povas, bonvolu sendi fotokopion de anoncoj aŭ komentoj pri ATEO kiujn vi trovas en gazetoj, aparte kiam temas pri revuoj ekster la listo en Bulteno #2 (p. 4). Aldone al tiu listo, aperis anoncoj en gazetoj Starto, La Movado [el Japanio], kaj The Worker Esperantist.

Kiel vi rimarkas, mi citas el viaj interesaj leteroj en nia bulteno kaj revuo, sen mencii vian nomon kaj plej ofte vian landon, por protekti vin kaj la konfidencecon de viaj leteroj. Mi daŭros agi tiel se vi ne petos alie. Se vi volas aŭ permesas ke mi publikigu viajn komentojn kune kun via nomo, bonvolu mencii tion en viaj leteroj.

Mi ricevas multajn informojn pri kondiĉoj en viaj landoj, temo kiu interesas multajn (la kongresintoj tiel entuziasmis), sed mi ĉerpas, sen subskribo, por la rubriko "El Nia Leterkesto" ĉar ili ne estas laŭintencaj artikoloj. Ni ricevis, do presos kun subskriboj, artikolojn kiuj temas pri aferoj en diversaj landoj, ekz. Pollando kaj Izraelo, kaj ofte verkas ĉi tiujn artikolojn eksterlandanoj. Mi ne volas insulti niajn legantojn per publikigo de kritikoj de iliaj landoj kaj religioj fare de fremduloj kvazaŭ mi ne konsultus la civitanojn mem. Do, se vi havas opiniojn pri via lando aŭ religio, bonvolu verki artikolon. Se vi malkonsentas esprimitajn vidpunktojn, ekz. de fremduloj, bonvolu reagi letere aŭ artikole por korekti fuŝojn, sed sciu ke ni ne celas vin ofendi.

Preskaŭ ĉiuj leteroj el ĉiuj landoj estas tre entuziasmaj. Ne surprizas la varma subteno de homoj en multaj socialismaj landoj (kun kelkaj plendoj pri troa vulgareco). Miaj komentoj pri religio kaj politiko kaj mia militanta sinteno estas subtenataj kaj aprobataj plej fervore ŝajne el Katolikaj kaj triamondaj landoj. (Mi lernas kiom suferas izolaj ateistoj en Katolikaj landoj!) Mi ne tiel subtaksu la gravecon kaj entuziasmon de la Protestantaj (ŝajne pluralismaj) landoj de la "unua mondo" (okcidenta Eŭropo kaj Norda Ameriko - ŝovinisma koncepto, ĉu ne?). Multajn interesas la jamaj informoj pri aferoj en Usono, kaj kompreneble aliaj informas kaj informos pri siaj landoj. Entute, la reagoj pruvas ke ATEO estas avangarda kaj aktualeca en la mondo.

Ni ricevis multajn komentojn pri terminologiaj, konceptaj, politikaj problemoj de "ateismo", "liberpensismo," "raciismo," ktp. Ni publikigos multajn tiajn komentojn estonte, kaj kompreneble pli freŝdate ricevitajn leterojn.

Jen klarigo pri nia politiko. Unu homo ĉe la Universala Kongreso plendis pri mia politika polemiko kun akuzoj pri "faŝismo." Li emfazis ke ATEO devas ne esti politike tendenca. Finfine, tiu diris ke parolado pri "faŝismo" ktp. estas akceptebla kiel privata opinio sen oficiala ligo al ATEO.

Manpleno da aliaj personoj plendis letere pri mia tono, lingvaĵo, sinteno, k.s.

Mi volas nun klarigi la situacion por eviti ian ajn miskomprenon. Mi pensis ke mi sufiĉe klare diris en la dua bulteno ke ĉiuj miaj opinioj estas personaj, ne oficialaj starpunktoj de ATEO aŭ de ĝiaj eldonaĵoj. Mi supozas ke konfuziĝo ĉe kelkaj per-

sonoj estis neevitebla, ĉar mi estis la sola autoro de la bulteno kaj mankas klaraj tekstaj dividoj inter la partoj en kiuj mi funkcias kiel redaktoro kaj prezidanto kaj la partoj en kiuj mi funkcias nur kiel privata persono. Mi intencas de nun plejparte meti miajn personajn komentojn, aparte pri sociaj kaj politikaj temoj, en apartaj artikoloj kun mia subskribo. En aparta rubriko, mi rajtas kiel redaktoro komenti pri la artikoloj de aliaj. Mi komentos en redakcia rubriko plejparte pri aferoj organizaj kaj oficialaj aŭ pri aferoj kiuj iel interesus ĉiujn legantojn kaj membrojn. Mi certas ke ĉi tiu solvo kontentigos ĉiujn.

Intertempe, se vin ofendas io en la du bultenoj, bonvolu kulpigi nek Ges-rojn Massen nek ATEO-n. Kulpigu nur min persone, kaj mi volonte publikigos viajn komentojn.

Do, ATEO ne havas oficialan politikon krom siaj difinitaj celoj. Ni plej taŭge nomu ATEOn pluralisma, ne neŭtralisma.

Unu celo nia estas gardado de neŭtraleco en la "neŭtrala" Esperanto-movado. Se vi havas komenton, aŭ plendon, bonvolu informu nin. Ni ekzistas plejparte por la komunikado de pensoj. Se vi deziras ke ni iel agu pri perfidoj de neŭtraleco, bonvolu mem sugesti deziratan rimedon. Ni ne lanĉos tian agon sen aprobo de nia politiko fare de la membraro de ATEO.

Kelkaj esprimis maltrankvilon pri la meĥanismo de demokratio en ATEO. Ekzemple, iu postulis, ke la membraro rajtu elekti estraranojn per sekreta balotado. Mi tute konsentas. Rimarku la proponatan statuton ĉe punkto 7.4 (vidu paĝon 20), ke la estraro elektiĝas dum ĉiu jarkunveno ĉe la Universala Kongreso. Pro urĝo verki kaj sendi statuton al UEA kune kun kontrakto por ligiĝo kun UEA de ATEO kiel neneŭtrala kunlaboranta faka asocio, tiu punkto estas nebula kaj silentas pri la maniero de elekto de la estraro. Do, la partoprenantoj de Universalaj Kongresoj konsistigas nur malgrandan eliton el la tuta membraro de ATEO, do la kunvenantoj per si mem ne rajtas decidi iajn ŝanĝon en la estraro aŭ gravan ŝanĝon en nia politiko. La kongreso devus esti nur la okazo por oficialigo de gravaj decidoj; la tuta membraro devas havi voĉon. Mi kredas, ke ni devos ŝanĝi la statuton. Mi invitas vin: skribu kaj donu viajn sugestojn.

La potenco restas ĉe vi. Sen financado, sen homoj kaj rimedoj por produkti niajn publikaĵojn kaj alimaniere labori, ATEO ne povas funkcii. Sen la malavara subteno de Ges-roj Massen, vi ne legus ĉi tiun revuon. Se vi ne helpos subteni ATEOn finance, la rego super ĝi restos en la manoj de monhavaj subvenciantoj. Mono regas eĉ en nia "granda rondo familia." Mi mem havas nur ideojn por komuniki kaj preton redakti. Tri homoj ne povas fari ĉion. Se vi havas talentojn aŭ rimedojn (organizi, presi, multobligi kaj dissendi publikaĵojn, redakti, ktp.) disponi al ATEO, des tiom da demokratieco en nia organizo.

Kelkajn vortojn pri la unua numero de Ateismo. Mi nek redaktis ĝin nek kontribuis al ĝi. Pro temporĝo kaj miaflanka malfruo Ges-roj Massen propraniciate preparis kaj eldonis la unuan numeron. Mi do ne kulpas pri iuj troveblaj lingvaj aŭ aliaj eraroj, sed por ATEO mi petas pardonon, aparte flanke de la verkintoj. Ni esperas eviti estontajn tiajn misaĵojn. Fine, pensu aŭdace, kaj kontribuu laŭeble al la konstruo de nova Esperanta kulturo. Ni staras sojle de grandaj faroj!

## El: **Dio kaj la Ŝtato**, de Mikaelo Bakunin
### Esperantigita, el angla traduko, de Ralph Dumain

Se Dio ekzistas, li estas nepre la eterna, superregada, absoluta mastro, kaj se tia mastro ekzistas, la homo estas sklavo. Se la homo estas sklavo, por li maleblas justeco, egaleco, frateco, kaj prospero. Vane, alfrontanta ĉian sagacon kaj lecionon el la historio, oni reprezentas, ke sian Dion motivas la plej tenera amo de homa libereco. Mastro, kiu ajn kaj kiel ajn liberala li sin ŝajnigas, restas tamen ĉiam mastro, kies ekzisto nepre implikas la sklavecon de ĉio malsupera. Do, se Dio ekzistus, li povus servi homan liberecon per nur unu rimedo: ĉesi ekzisti.

Kiel ĵaluza amanto de homa libereco kaj taksante tion la absoluta kondiĉo de ĉio, kion mi admiras kaj respektas en la homaro, mi renversas la proverbon de Voltaire, kaj mi asertas ke se Dio efektive ekzistus, necesus lin elimini.

* * * * *

Kio estas aŭtoritateco? Ĉu la neevitebla potenco de la naturleĝoj kiuj sin manifestas laŭ la necesa koneksiĝo kaj sekvado de fenomenoj en la fizikaj kaj sociaj mondoj? Kontraŭ ĉi tiaj leĝoj ribelo estas ne nur malpermesata, sed ja malebla. Eble ni mise aŭ tute ne komprenas ilin, sed ni ne povas malobei, ĉar ili konsistigas la bazon kaj fundamentajn kondiĉojn de nia ekzisto. Ili ĉirkaŭas nin, penetras nin, reguligas ĉiajn niajn movojn, pensojn, kaj agojn. Eĉ tiam, kiam ni kredas ke ni malobeas ilin, ni montras nur ilian ĉiopovecon.

Ja, ni estas absolute la sklavoj de naturleĝoj, sed en tia sklaveco mankas humiligo, fakte entute mankas sklaveco, ĉar sklaveco antaŭsupozigas eksteran mastron, leĝdonanton, sed naturleĝoj ne estas eksteraj sed internaj de ni; ili konsistigas nian tutan eston. Fizike, morale, kaj intelekte, ni vivas, spiras, agas, pensas, deziras nur per naturleĝoj. Sen ili ni estus nenio. Do de kio ni ĉerpus la deziron aŭ potencon por kontraŭ ili ribeli?

En rilato kun naturleĝoj nur unu libero eblas al la homo: rekoni kaj apliki ilin pliampleksige en konformo kun la celo de kolektiva kaj individua emancipigo kaj homigo kion li celas. Ĉi naturleĝoj, jam rekonataj, montras aŭtoritatecon neniam disputatan de la homamaso. Oni devus esti funde folo, teologo, metafizikisto, juristo, aŭ burĝa ekonomikisto por ribeli kontrau la leĝo ke duobla du egalas kvar. Oni devus posedi kredon imagante ke fajro ne brulus aŭ akvo ne dronigus krom ia baziĝo sur alia kaŝita naturleĝo. Sed tiaj fuŝaj fantazioj de malebla ribelo estas la esceptoj, ĉar ĝenerale la homamaso ĉiutage agnoskas la regnon de baza sagaco, t.e. de la naturleĝaro.

Granda domaĝo estas ke granda nombro da naturleĝoj rekonitaj de la scienco restas nekonataj de la homamaso dankon al la kuratoreco de registaroj. Des pli probleme, la plejmulto da naturleĝoj rilate la evoluon de la homa socio, same necesaj kiel la naturleĝoj de la fizika mondo, estas ankoraŭ ne konstatitaj aŭ rekonitaj de la scienco mem.

Kiam ili estos konstatitaj de la scienco kaj poste per popolklerigo eniros la konscion de ĉiuj, la problemo de libereco estos definitive solvita.

* * * * *

Modernaj idealistoj komprenas aŭtoritatecon tute malsame. Kvankam liberaj de la tradiciaj superstiĉoj

de ĉiuj ekzistantaj pozitivaj religioj, ili tamen algluas al aŭtoritateco dian signifon, bazitan plejparte sur nebula religia kredo kaj sentimentaleco ideala kaj astrakte poezia. Ilia religio estas lasta klopodo diigi ĉion homecan en homoj.

Ĉi tio estas la tuta malo de nia laboro. Por homaj libero, digno, kaj prospero, ni kredas ke nia devo estas regajni de la ĉielo la valoraĵojn kiujn ĝi ŝtelis de la tero kaj refoje ilin surterigi. Niaj oponantoj, male, klopode por fina religie heroa ŝtelo, realpropigus al la ĉielo, tiu dia rabisto, ĉion plej noblan kaj bonan de la homo. Jen la vico de ni liberpensuloj disrabi la ĉielon per aŭdaca esplorado kaj scienca analizado.

La idealistoj nepre kredas ke homaj ideoj kaj agoj bezonas dian sankcion por akiri aŭtoritatecon. Kiel ĉi tiu sankcio manifestiĝas? Ne per miraklo kiel en pozitivaj religioj sed per la grandiozeco aŭ sankteco de la ideoj kaj agoj mem: kio ajn estas grandioza, bela, nobla, justa, tio estas dia. En ĉi tia nova religia kulto ĉiu homo inspirita de ĉi tiaj ideoj kaj agoj fariĝas pastro rekte konsekrita de Dio mem. La pruvo? Oni bezonas nenian krom la grandiozecon de siaj ideoj kaj agoj.

Tia estas tiu tuta filozofio: filozofio de sentimentoj, ne de realaj pensoj, speco de metafizikeca pietismo. Ĉi tio ŝajnas sendanĝera sed estas efektive tute la malo, kaj la strikta kaj malfekunda doktrino kaŝita sub la netraperceptebla nebuleco de ĉi tiuj poeziaj formoj kondukas al ĉiuj samaj disastraj rezultoj kiel faras ĉiuj pozitivaj religioj, t.e., la kompleta negado de homaj libereco kaj digno.

Proklami dia ĉion justan, noblan, kaj belan en homeco estas implicite konfesi, ke la homaro mem ne povus produkti ĝin, t.e. ke lasita al si mem la homa naturo estas malbela, malbona, kaj malica. Jen la esenco de ĉia religio: la kalumniado pri la homo por desplia glorigo de dieco. Je tiu momento ke oni konfesas la naturan maladekvatecon de la homo kaj lian fundamentan malpovon mem sin atingi sen la helpo de dia inspiro komprenon de justaj kaj veraj ideoj, necesas akcepto de ĉiuj teologiaj, politikaj, kaj sociaj sekvoj de pozitivaj religioj. De la momento ke Dio la perfekta kaj superreganta estaĵo alfrontas la homon, aliaj perantoj aperas sur tero por klerigi, konsili, kaj regi en la dia nomo la homon.

Ĉu ĉiuj homoj egale inspiriĝas de Dio? Do perantoj senutilus. Sed ĉi tiu supozo estas malebla ĉar kontraŭdiras tro evidente la faktoj. Ni devus agnoski la diinspiron de ĉiuj eraroj, absurdaĵoj, hororaĵoj, stultaĵoj, misfaraĉoj, kaj malnoblaĵoj en la mondo.

* * * * *

Diigo de homaj ecoj fare de idealistoj ĉiufoje rezultigas la triumfon de brutala materialismo. La kialo estas simpla: la dia vaporiĝas kaj leviĝas al propra ĉiela tereno; sole la brutala restas sur tero.

Jes, la necesa sekvo de teoria idealismo estas praktike la plej brutala materialismo.

* * * * *

Religia aŭ filozofia idealismo servas ĉie kiel la standardo de materia, sanga, brutala perforto, de senhonta materia ekspluatado. Male, la standardon de teoria materiismo, la ruĝan standardon de ekonomia egaleco kaj socia justeco levas la praktika idealismo de la subpremata kaj malsata homamaso tendencanta al la efektivigo de libereco kaj egalrajteco en la gefrateco de tuta homaro.

Kiuj estas la efektivaj idealistoj, ne de abstrakteco sed de vivo, ne de ĉielo sed de tero, kaj kiuj estas la materialistoj?

Memevidente la esenca kondiĉo

de teoria aŭ dia idealismo estas la cedo de logiko, de rezonkapablo, la malvenko de scienco. La defendantoj de idealismaj doktrinoj troviĝas en la kampo de la subpremantoj kaj ekspluatantoj de la homamaso. Jen du gravaj kialoj kiuj devus sufiĉi por malalogi ĉiujn grandajn mensojn kaj korojn for de idealismo. Kial aktualaj bonvolaj idealistoj persistas reprezenti doktrinon kondemnendan kaj malhonorigendan?

Ilin nepre influas potenca motivo; ne scienco aŭ logiko, ĉar ĉi tiuj jam verdiktis kontraŭ idealismo. Se ne eniras persona gajncelo, kia do la motivo? Sendube, tiaj homoj kredas ke idealismaj kredoj aŭ teorioj necesas por la morala digneco de la homo kaj ke materiismaj teorioj bestigas la homon.

Kaj la vero estas tute la malo!

Ĉia evoluaĵo implikas la negadon de la elirpunkto. La elirpunkto de materiismo estas materia, do la negado devas esti ideala. Komence de la efektiva mondo aŭ materio (abstrakte nomita), materiismo laŭlogike alstrebas idealigon, t.e. homigo kaj plena emancipigo de la socio. Male, la ideala elirpunkto de idealismo rezultigas necese la materialigon de la socio, la organizadon de brutala despotismo kaj malnobla ekspluatado fare de eklezio kaj ŝtato. Historia evoluo de homo laŭ materiisma skolo estas progresiva leviĝo, laŭ idealisma sistemo povas esti nur daŭranta degenero.

Kian ajn demandon ni ekzamenas, ni trovas ĉiuokaze ĉi tiun esencan kontraŭdiron inter la du skoloj. Do, materiismo komencas de besteco por starigi homecon; idealismo komencas de dieco por starigi sklavecon kaj por kondamni la homamason al senfina besteco. Materiismo malagnoskas la liberan volon kaj finas per liberigo; idealismo en la nomo de homa digno proklamas liberan volon kaj fondas diktatorecon sur ruino de libereco. Materiismo malakceptas la principon de aŭtoritateco ĉar ĝi prave taksas ĝin la kunulo de besteco kaj ĉar, male, la triumfo de homeco, la celo kaj signifo de la historio, realiĝas nur per libero. La idealistoj ĉiam praktikas materialismon; la materiistoj celas kaj efektivigas la plej bele idealajn aspirojn kaj pensojn.

## Distribuo de ATEO-Membraj Nomoj en Ĉiu Lando

de Kun-Redaktoro kaj Vic-Prezidanto

En la lasta numero de ATEISMO sur paĝo 20, ni eldonis leteron de membro el Ĉeĥoslovakio kiu petis nomojn kaj adresojn de aliaj membroj kiuj loĝas en sia lando, por ke li kontaktu ilin.

Ni pensis ke tio estas bona ideo, kaj ke la ATEO estraro povus provizi servon al niaj membroj: interne de ĉiu lando, ni sendus nomojn/adresojn de ĉiuj membroj al ĉiu membro. Do, la membroj povus kunigi ĉe E-o kunvenoj, k.t.p.

En la lasta numero, ni petas ke ĉiu membro skribi al ni, se li/ŝi volas havi sian nomon sur listo de ATEO-membroj por sia lando, por sendi al aliaj membroj. Sed nur kelke da membroj skribis! Tamen, ni ĵus ricevis pluan leteron, de pola membro, kiu faris la saman peton.

**Se VI volas kontakti aliajn ATEO-membrojn en via lando, bonvolu skribi al ni ĉe San Francisko** (vidu eksteran dorsan kovrilon por adreso). **Ni ne sendos iujn ajn nomojn sen permeso.**

## Dio kaj Holokaŭsto, de Adolph Grünbaum

Tradukita de Ludisto Mirinda, el Usono
El la revuo, *Libera Enketisto*, vintro 1987/88

La problemo de malbono estas daŭre konfuzinta tiujn kiuj kredas je la regado de la mondo far justa, eĉ tutbonvolema dio. Ne mirinde, do, la influa dudekjarcenta juda teologo Martin Buber taksas la nazian holokaŭston kiel ege akutan defion de la doktrino de dia justeco.

Buber sin sentis devigita konkludi ke Dio portempe eniras eklipson. Sed kial bonvolema Dio povus eniri eklipson por kontentigi tiajn estaĵojn kiel Adolfo Hitler, Buber ne povus ekspliki. Finfine, eniri tian eklipson ŝajnus morale senrespondecan malzorgon fare de Dio. Fakte, se oni kredu Buber, kaj se oni rigardas en la historion de la socioj kiuj estas ĉirkaŭbrakumintaj teismon en unu aŭ alia formo, estas malfacile trovi iun ajn tempon kiam Dio ne estis almenaŭ en parta eklipso.

La teologio de Buber estas nur lama kaj frivola. Pli novaj apologioj de la Holokaŭsto el judaj religiaj fontoj estas estintaj senpudoraj. Sir Immanuel Jakobovitz, la Ĉefrabeno Ortodoksa de Britujo kaj la Brita Regnaro, asertis ke la nazia holokaŭsto estis dia puno por la apostateco de la germanaj judoj kiuj fondis Reformitan Judismon. "Ĉi tiu idolo de individua asimilado," li skribis, "eksplodis en la lando mem kie ĝi estis inventita, por eventuale esti fandita kaj forbruligita en la kremaciejoj de Auschvitz."

Nun, kiam la S.S.-viroj kiuj efektivigis la "finan solvon" havas siajn rekuniĝojn, ili povas diri, surbaze de la aŭtoritateco de neniu alia ol la Ĉefa Rabeno de la Unuiĝinta Regno, ke ili estis nuraj instrumentoj de la dio de Moseo. Fakte, se oni kredu Rabenon Jakobovitz, la kolerego de Dio estas tiom sendistingema, ke ĝi instigis la naziojn kremacii piajn ortodoksajn judojn el la tuta Centra Eŭropo ne malpli ol la supozinte malvirtajn reform-judojn de Germanio. Kaj plue, la venĝemo de ĉi tiu dio estas tial, ke la puno pro doktrina deflankiĝo, eĉ ene de mosea teisma framo, devis esti nenio malpli ol viv-kremacio, anstataŭ iom pli milda kaj ŝanĝebla malbonsorto. Multe malpli ol justa, dio kiu sendistinge ordonas grandskalan mortopunon kaj permesas ke beboj estu mortigitaj antaŭ siaj patrinoj far S.S.-anoj estas sadisma, satana monstro kiu meritas tutkosman abomenon anstataŭ adoradon kaj amon.

Rabeno Jakobovitz ne estas la sola kiu opinias ke la Holokaŭsto havis la aproban de Dio. Kiel raportite en antaŭnelonga prelego far la elstara israela klerulo Amos Funkenstein, la ultra-ortodoksa rabeno Joel Teitelbaum - kiu loĝas en Jerusalemo sed taksas la judan laikan ŝtaton kaj registaron de Israelo pekajvidas la Holokaŭston kiel dia puno pro la fondado de cionista ŝtato antaŭ ol la promesita alveno de la pretendita nova Mesio. Memvideble, rabeno Teitelbaum ankaŭ taksas la justecon de Dio morale maldistingema. Fakte, la plej multaj judoj kiuj pereis en la kremaciejoj ne eĉ estis cionistaj, des malpli aktivaj civitanoj de la ŝtato de Israelo. Kaj verŝajne ambaŭ rabenoj forgesas ke la principo de amasa kolektiva kulpo kaj justeco estas ne malpli ofte invokata de Islamaj teroristoj atakantaj israelajn civitanojn.

En sia artikolo "Hook is Mired in Secular Confusion" (proksimume "Hook Estas Kaptita en la Marĉejo de

Laika Konfuzo") (FI, Aŭtuno 1987), rabeno Y. D. Homnick superas Buber, Jakobovitz kaj Teitelbaum en sia klara ekvido de la mano de Dio en la Holokaŭsto. Riproĉante Sidney Hook pro lia senscia rigardo, li asertas ke "Jes, sen ia dubo, la gvidado de la historio far Di' estas perceptebla eĉ al nia limigita vidkapablo. La senso de justeco . . estas palpebla. . . Precipe la Holokaŭsto estas pruvo de la justeco de Di', alvenante kiel kulmino de jarcento en kiu la plej multaj judoj, post miloj da jaroj da lojaleco en la ekzilo, decidis forĵeti la jugon de la Torao." Oni povas noti ke en sia ververa peano (PIV) al dia venĝo, Homnick sekvas la ortodoksan judan regulon montri respektegon ellasante la literon "o" en la literumado de "dio." Tion farante, li dismontras la ĉiaman konfuzon inter la nomo kaj sia objekto, kredante ke la uzo de la tuta nomo iel malgrandigas la sanktecon de la objekto. Ĉi tiu konfuzo fontas el la malnova kredo je vort-magio bone konata de la studo de sovaĝuloj.

## Religio en la Lerneja Sistemo de Britio

de Peter A. Danning, el Britio

La lerneja sistemo de Britio baziĝas sur leĝo de la jaro 1944. Magistratoj organizas la lokajn lernejojn kaj la instruatajn fakojn. La sola deviga fako laŭ la leĝo estas "religia edukado" - ankaŭ la sola fako, de kiu gepatroj havas la rajton forestigi siajn idojn. Tiun devigan fakon iam instruis pastroj (aŭ rabenoj k.s.), sed nuntempe plej ofte ne religiaj fakuloj. Tiuj nun ne ofte asertas la kristanan etikon, sed donas historian kaj faktan komparon pri diversaj religioj, inkluzive de Budhismo, k.t.p.

Post la lernajaj jaroj, malpli ol 15% de la brita popolo kutimas partopreni diservojn.

Nun en 1988, la registaro intencas novan leĝon pri edukado, kun listo de fakoj instruendaj (ekz. matematiko, scienco, unu fremda lingvo, k.t.p.). La plej lasta plano antaŭvidas religian instruadon bazitan sur la kristana tradicio de Britio, sed kun instruado pri aliaj religioj en lernejoj kun sufiĉe nombraj judaj, islamaj, hinduaj aŭ aliaj infanoj.

Ĉefministro Margaret Thatcher kaj granda parto de ŝia ministraro sentas sin fervoraj kristanoj aŭ judoj. Tamen, estas interesa paradokso, ke la episkopoj de la anglikana eklezio emas laŭte kaj ofte kritiki la Thatcher-an politikon, en maniero ne aŭdite dum la regado de antaŭaj registaroj.

Ateistoj eble ne tro malĝoju. Deviga religia instruado en lernejo havas kiel sekvon, ke pli ol 85% de la loĝantaro ne poste partoprenas religiajn ritojn.

## Artikoloj, Kartunoj kaj Ŝercoj por Venontaj Numeroj

Evidente, ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en via lando. Ni deziras taŭgajn kartunojn kaj ŝercojn. **Bonvolu sendi viajn kontribuojn baldaŭ!**

Ankaŭ, ni bonvenigos viajn leterojn pri ATEISMO, kaj ni penos respondi senprokraste.

**Vidu eksteran dorsan kovrilon por la estrara adreso!**

## Kelkaj Komentoj pri Religio en Pollando, de Anonimulo

Laŭ la pola konstitucio la eklezio estas disigita de la ŝtato.

La lernado de religio (ne pri religio) okazas ekster la ŝtataj instancoj kaj ne estas subvenciata de la ŝtatbuĝeto. Tamen tio okazis kiam la forto de la ŝtatorganismo estis nesubtaksebla, sed aktuale, eĉ maltrankvilige, perdiĝas paralele al la malfortiĝo de la ekonomio.

Eble vi memoras la fifaman eksceson en unu el la lernejoj de Pollando, kie malkleraj gejunuloj stultece luktis por - surpendigo de la katolikaj krucoj en la lernoĉambroj. La katolikaj pastroj komencis okupacii la lernejojn kune kun la gelernantoj asertinte, ke ili donas spiritan apogon al la gejunuloj. Bedaŭrinde, la klerigaj aŭtoritatuloj hezitis longe kaj la problemo ŝvelis, ĉar uzo de la perforto kontraŭ la pastroj vekus amasan proteston de la episkoparo, socio, kaj de la okcidentaj registaroj, kiuj kutime estas ignorantoj pri la polaj kaj entute orienteŭropaj problemoj. Dankon al ges-roj Reagan kaj Thatcher, mi antaŭvidas pluan kreskon de la forto de la romkatolika eklezio. Mi supozas pluan regreson de la intelekta influo en la publika vivo.

Hieraŭ mi spektis televide la tutlandan rikoltofeston, kiun ĉeestis registaro kaj partiestroj, dum kiu la tuta spektantaro kantis kune kun la artistoj religian kanzonon, nacian himon, kaj la "Internacionalon." Antaŭ kelkaj tagoj pola televido prezentis filmon pri la junulara movado katolika, kiu fakte grupigas la potenciale plej valoran junularan tavolon kiu seniluziiĝis pri la situacio en Pollando, sed tiuj travivas religiajn ekstazojn perdinte la vojon al la racia mondo. Neniu helpis ilin en lernejoj kaj gepatroj instruis ilin nur pri katolika mondkoncepto.

En la polaj lernejoj oni ne instruas multon pri ateismo kvankam la lernoprogramoj estas konceptitaj laŭ la racia vidpunkto. Antaŭ kelkaj jaroj la ministerio pri instruado enkondukis la novan lernobjekton: scio pri religioj, por ke la junularo ne akceptu religiojn senhezite kaj sendube, pro kio multaj katolikaj oficialuloj kaj intelektuloj arde protestis.

Bonvolu ne preterlasi la novan politikon de Sovetio pri la ortodoksa eklezio - kvankam mi tute ne komprenas kaj ne scipovas diveni la motivon - kaj vi trovos la sekvan faktoron de la plikresko de la forto de la eklezio en Pollando.

Mi parte konsentas, ke la influo de la eklezio en Pollando malfortiĝas en urboj kaj fortiĝas en vilaĝoj, [vidu Bultenon de ATEO #2, p. 5] sed oni devas diferencigi, ke la enurba kredoformo estas pli intelekta kaj alprenas la rolon de opozicio kontraŭ la reganta partio. La premo de tiuj medioj en la universitatoj estas tiom signifoplena, ke la regantoj antaŭvidas la permeson fondi la katolikajn studentajn organizojn ĉi-aŭtune.

Kaj finfine la ateisma sinteno tre ofte vekas personan malemon ĉe nesufiĉe kleraj homoj, ĉar fojfoje oni asociigas la ambaŭ nociojn: ateismon kun subteno de la registaro kaj socialismo. Al la nekredantoj oni altrudas ĉi-specan sintenon kvazaŭ akuzante nin ĉiujn respondecaj pri la plej profunda krizo en Pollando post la milito, sendepende de niaj realaj politikaj simpatioj.

**Ĉu vi pagis vian abonkoston por 1989?** Se **"P89" ne** aperas post via nomo sur la koverto en kiu ĉi tiu numero alvenis, la Sekretario-Kasisto **ne** ricevis vian pagon. Bonvolu legi la tekston sur la interna dorsa kovrilo.

# El nia Leterkesto . . .

## Pri Usono

"Via ideo ekinteresis min ĝuste pro tio, ke ĝi naskiĝis en Usono, en lando kun riĉa religio."

**Ĉef-Redaktoro**: Ĉu la vorto "riĉa" estas intenca vortludo?

---

"Mi tute konsentas .. ke la Bibliaj religioj estas plenplenaj da kontraŭdiroj kaj ke la Kristanismo estas la plej hipokrita ideologio en la homa historio. Sed ankaŭ la artikoloj pri faŝismo estas tre interesaj kaj mi eksciis ke la usona "konservativismo" egalas kun "faŝismo." Ĉi tiu informo estas por mi tre valora."

"Iom ne plaĉis al mi viaj akraj vortaj atakoj kontraŭ religiuloj. Tamen mi ne sciis, ke eĉ en moderna, libereca lando Usono .. la religiuloj tiom influas la socion. Mi supozis, ke en Usono la kapitalo iom regas .. sed mi pensis, ke ideologie tie estas libereco, pureco, kaj eĉ racieco: ke oni racie klopodas, eble tro racie, plej multe akiri monon kaj .. vivi .. sen antaŭjuĝoj kaj ideologiaj .. balastoj. Eble se mi vivus en simila kapitalisma lando, mi .. same atakus religiojn kaj ties adeptojn."

**Ĉef-Redaktoro**: En Usono, la racieco multe varias en nia socio de epoko al epoko, de regiono al regiono, de klaso al klaso, de farmo al urbo. Mia resumo estas, ke nia popolo aktuale degeneras. La ideologio de la kapitalistoj multe ŝanĝiĝis en la Reagan-a epoko. Ne plu regas socialdemokrata, senideologia pretendo kiu regis en la 1960aj kaj 1970aj jaroj kiun vi priskribis, sed regas agresa malracieco, ideologiemo, trompa moralismo, ekstrema ŝovinismo, kreskanta rasismo, kaj senkompata atenco kontraŭ la laborista klaso. Miaopinie, la kapitalistoj preparas nin por milito kaj faŝismo. Mi intencas verki pri tiu temo detale.

---

"La subteno de [religiaj] grupoj al fiaj agoj de Reagan kaj la militista aparato, pro la potenca pozicio de Usono, malbone influas vere solvi mondajn problemojn. Tamen, ankaŭ en aliaj landoj .. religia partio ĉiam denove ebligas subtenon de la registaro al tia politiko, kaj ke anoj de eklezioj senpripense sekvas gvidantojn nur ĉar tiuj apartenas al la sama religio aŭ misuzas vortojn el nebulaj sanktaj libroj. Do kontraŭ misuzo de religiaj sentoj do troviĝu racia pensado. Tamen, mi supozas ke oni ne tro akre traktu ĉiujn homojn kun religia fono, ĉar mi samtempe konstatis ke ekzemple en Usono kaj en nia lando tiaj homoj pli persiste kaj efike batalis kontraŭ la atombombo, por tutmonda kunlaboro, por helpo al progresemaj fortoj en la tria mondo, ktp., ol eksterreligiuloj ĝenerale faris. La ateistoj disvastigu siajn ideojn kaj argumentojn, sed ne malhelpu komunajn agadojn por la bono de la mondo. Kredeble estos pli facile disvastigi nereligiajn konceptojn kiam oni ne jam aspektas netolerema .. Mi gratulas la progresemajn fortojn en Usono ke ili sukcesis senmaskigi Reagan."

**Ĉef-Redaktoro**: Konsentite, necesas praktike unuiĝanta fronto de ĉiuj progresemuloj. Sed en teoria eksplikado de sociaj fortoj, materiistoj devas diferencigi ilin de mistifikuloj. Estas mia tasko pruvi, ke religia mistifikado malhelpas la progreson de sociaj movadoj. Mi pretas argumenti, ke la religioj de Gandhi, Malcolm X, Martin Luther King, Daniel Berrigan, kaj aliaj fakte malhelpis konadon de la reala mondo

kaj elpensadon de ĝusta revolucia strategio.

---

"Mi bone komprenas viajn personajn reagojn; la pritraktitaj temoj, eventoj, kaj novaĵoj okazintaj en via ĉirkaŭaĵo motivas vian akran ribelemon. Ĉie la ŝtataj politikoj devas esti pli malpli la samaj."

"Gratulon al via kuraĝa sinteno; bonvolu daŭrigi la instruadon pri la sociordo kiu regas en via lando."

"Al mi ege plaĉas via starpunkto, via firme kontraŭfaŝisma sinteno. Ankaŭ via memdifino kiel materiisto .. estas tre ĝojiga afero trovi vin, kiu apartenas al malofta speco en Usono. .. Mi diru ke mi ŝatas vian polemikan stilon, kaj ke mi bone komprenas vin kaj vian koleron pro la freneza situacio de via lando, kie plej krudece montriĝas la degenero de la burĝa socio."

## Pri Latinameriko

"Por mi la afero iom malsimilas [ol por Usonanoj], ĉar en Latinameriko naskiĝis ene de la Katolika Eklezio forta revolucia tendenco. .. Ĉar la ekspluatataj klasoj ĉi-tieaj havas pro historiaj kialoj precipe religian mondkoncepton, estas absolute necesa nova, revolucia religia mondkoncepto .. la Teologio de Liberigo. .. Nuntempe akra klasbatalo okazas en la interno de la Katolika Eklezio. .. Estus eraro nun akcenti la filozofiajn diferencojn kun la kristanoj kiuj ankaŭ estas viktimoj de la sistemo.

".. min multe interesas kaj stimulas la ideologia lukto kontraŭ la stultaj kristanaj dogmoj, eraraj kaj kontraŭsciencaj. Kompreneble, mi ne akceptas la kontraŭklerikalan burĝan ideologion, ĉar ĝi estas nur tio. La laborista klaso jam spertis ke sia situacio absolute ne ŝanĝiĝos per la laikaj reformoj entreprenitaj de tiaj kontraŭklerikaluloj.

"Mi speciale malamas la Protestantajn Fundamentismajn ekleziojn, la parakristanajn sektojn (Mormonojn, Jesu-Atestantojn, Moon-istojn). La Pentekostaj sektoj kaj aliaj same vomigaj ekleziaĉoj estas novaj formoj de imperiisma kaj reakcia enpenetrado. Eble vi scias ke la fiulo Jimmy Swaggart venis al mia lando ... [kaj] apogis [ĝian faŝistan diktatoron]."

**Ĉef-Redaktoro**: Dankon pro via entuziasma subteno. La Liberiga Teologio kiel kuracilo de ortodoksa pasiviga kristanismo estas laŭ mi simila al la drogo metadono kiel anstataŭaĵo por heroino. Se senesperaj analfabetaj kamparanoj ne povas vivi sen teologio, des bone la liberiga. Liberiga Teologio tamen ŝajnas al mi kontraŭdira koncepto. Cu eblas la kreado de iu revolucia kristana koncepto kontraŭ la spirita sklaveco, personkulto, fetiĉisma pensmaniero, kaj ĝisosta hipokriteco kiuj estas esencaj partoj de la kristanismo?

## Pri Britio kaj Sovetunio

"Iu ajn kiu malamas [Thatcher] "la feran virinon" estas amiko de mi. .. Kiel vi bone scias, kristanismo estis inventita por la riĉuloj, kaj kiel vi bone scias, oni povas pruvi ion ajn per citaĵo de la biblio, kaj kompreneble Thatcher trovis citaĵon taŭgan. .. Por [ŝi] la biblio diras "la malriĉulojn vi havos ĉiam inter vi." Por vi kaj mi ĝi diras "Ne respondu al la stultulo je sia stulteco pro timo ke oni komparos vin al li." .. "Tiuj kiuj ĉeestas la diservojn [en Sovetunio] ne estas ĉiuj kristanoj .. ili nur deziras ĝui senkostan teatraĵon."

## Pri La Papo Denove

"Tre utile estas, se la batalanta ateisto scipovas bibliajn aforismojn, kiuj el si mem ridigas la religion kaj

pruvas la mondan devenon de la Biblio, aparte la Nova Testamento kun multaj komunistaj pensoj kiujn la fipastroj tute ne ŝatas, ankaŭ ne la nuna ruza papo, kiu intencas subfosi la tutan polan sociordon, por poste reprivatigi ĉiujn polajn riĉaĵojn .. Vojtila (Papo Johano II) estas la insida instrumento de la internacia imperiismo. Ĉiuj papoj estis iloj de la Mamono, t.e. monsakuloj."

## Pri Pollando

"Liberpensuloj en Pollando devas fronti la atakojn ĉe ambaŭ flankoj, t.e. la Katolika Eklezio kaj la komunista registaro .. ni povas eĉ ne revi pri demokratio. Mi multajn malbonaĵojn suferis kaj de l'religiaj fanatikuloj kaj de komunista sistemo. .. En Pollando 90% da homoj estas di-kredantoj kaj ĉiu realisto devas tion ĉi prikonsideri. Vi pravis dirinte ke la Papo estas trompisto kaj ĉarlatano, mi konsentas. Vi pravas prezentante la prezidenton Reagan kiel faŝiston. Sed ni ĉi tie .. havas la saman specon de regantoj .. regas ruĝa burĝaro."

"Mi laboras en hospitalo kaj nun mi havas noktan deĵoron. Estas trankvilo, silento, kaj granda malpleno, malpleno kaŭzita de morto de homo. Kompreneble ne estas tio la unua morto kiun mi vidis en mia vivo. Sed hodiaŭ mortis juna viro. Mortis rapide, tro rapide. Infarkto kaj senforteco de kuracistoj, kaj eble de Dio? Se li ekzistas. Ĉi tiu dubo turmentas min .. realeco mortigas la kredon. Tiom da malbono kiun mi renkontas ĉiutage ne permesas kredon. Mi estas disŝira interne .. mi skribas al vi ĉar mi esperas ke homoj kiuj scias pri ATEO .. ankaŭ objektive rigardas la vivon. Mi volus kun ili iom paroli. Vi sinjoro certe miras, ke skribas al vi polo .. la lando el kiu devenas la Sankta Patro kaj kie katolikaj tradicioj estas tiel fortaj. Ĉe ni vivas ĉirkaŭ 95% katolikuloj, kaj malgraŭ tio, ŝtelado, banditismo, koruptado kaj venĝemo: tio nia ĉiutageco. Mi kaj verŝajne neniu kredas ke la ĉefaj kaŭzintoj de la malĉastaĵoj estas ĉi ceteraj 5%. Do kial ĉi tiu mensogo?"

**Ĉef-Redaktoro**: Mi tuj ekverkis respondon al ĉi tiu kortuŝa letero en formo de poemo, sed mi ne finverkis. Estas la tasko de ATEO doni moralan subtenon ĝuste al tiaj izolaj personoj kiaj vi. Se viaj kunuloj ne inspiras vin, se la neekzistanta Dio ne inspiras vin, trovu ie en la vivo, en vi mem, en inteligentaj homoj tra la mondo la bezonatan inspiron. Kiel skribis William Blake, la tuta mondo ĝemas por liberiĝo. Ni elkriu bele kiel furiozaj saksofonoj.

## Pri La Mondo

"En nia mondo, kiu estas minacata kiel neniam antaŭe pro homa malracieco, estas ordonata la aliancigo de ĉiuj kiuj batalas por la komuna konscio, ke la spirito nur tiom povos transvivi, kiom tiu estos konsciiginta al si mem la dependecon de la materio. Estas necese batali kontraŭ aroganteco de sendependa spirito, kiel tiu montras klare al si en la religioj, sed ne nur tie."

**Ĉef-Redaktoro**: La deziro de spirita sendependeco estas sopiro de materio al emancipiĝo el ĝiaj sufokaj limoj. La spirito devas iĝi memkonscia pri sia deveno kaj orientiĝi laŭ realaĵoj.

## De Protestanta Katolikulo

Ni ricevis leteron el kaduka religiulo de Pollando kiu konsilas kontraŭ fondo de ATEO kaj informas ke multaj malamikoj de Dio vane atakas religion. Li plu asertas ke religio

kaj Dio neniel malhelpas kulturon. Li plue sugestas ke estus pli utile se ni helpus blindulojn kaj donis taŭgan adreson.

Nu, sinjoro se vi pensas ke religio ne malhelpas kulturon, vi scias nenion pri la historio, evidente ĉar via ekzelio nenion utilan instruis al vi. Plue, mi sugestas ke vi skribu al via Papo kaj sugestu ke li vendu nur kelkajn siajn riĉaĵojn kaj pagi meritatajn impostojn en diversaj landoj kaj tiel povos propramane helpi ĉiun handikapiton kaj nutri ĉiun malsatulon en la mondo.

## Plue Pri Mia Sinteno

"Ĉu ni intencas imiti la Vatikanon? Faŝismon? Mi estas kontrau ĉiu spirita kazerna ardo: "Pensu antauen! Pensu dekstren! Pensu maldekstren!" .. senfina afero .. korporalo, kiu laute ordonas .. rekrutoj, kiuj pacience obeas. Mi tion nomas 'liniita pensado'!"

"Nia bulteno estas interesa, klara, kaj altnivela, sed devas eviti la vulgarajn vortojn. .. Vi devas verki ne kolereme, sed kun ĝojo kaj rideto sur viaj vangoj."

"Per viaj esprimmanieroj vi aspektas kelkfoje kiel "generalo" klopodanta kapti multajn soldatojn, konvinki ilin por pretigi fortan trupon por ĝin konduki kontrau difinita religia malamiko. Rimarkite: ĝenerale vi pravas, mirinda estas viaj sincereco kaj kuraĝo. .. Mi certe diskoniĝos vian movadon al kiu mi deziras la meritatan sukceson."

## Pri Agado de ATEO

"La celo de la asocio de liberpensuloj: ne konvinki aliajn, sed havi la plezuron renkonti samemulojn, kun kiuj ni povos interŝanĝi ideojn pri filozofiaj konceptoj."

"Dum konversaciado kun piuloj urĝe necesas, ke ni certe sciu. Ateismo ne estas nura kredo sed certa scio; ĝi ripozas sur scienco. Tial ni ĉiam estas pli fortaj. Ni ne bezonas torturbenkojn, brulŝtuparojn, religimilitojn, por konvinki la bedaŭrindajn simplajn homojn. Mi ĉiam lernas parkere kelkajn nombrojn, nomojn, faktojn."

## Pri Nia Revuo

"En la 16a, 17a kaj 18a jarcentoj .. ekaperis en Eŭropo adeptoj de sendiismo kies verkoj konservas ĝis nun grandan klerigan valoron. Ni elektu kelkajn el la plej elstaraj kaj ilin entute aŭ parte traduku .. kun taugaj enkondukoj kaj piednotoj."

"ATEO estu multespirita, multekolora. Kaj kial ne ankaŭ uzi la anglan lingvon apud Esperanto, aŭ aliajn lingvojn. .. Ekzemple la preĝo parolita de soldata pastoro je la 5-a de aŭgusto 1945 kiel krista beno favora al la atombombo destinita al Japanio. .. Aŭ multe de mallongaĵoj, kiuj tre efikas al la homa cerbo. Politika kaj filozofia spritaĵo estas danĝera armilo. La Hitleranoj tion timegis, tial ĉie pendis avertaj afiŝoj. .. Krome la mallongaj tradukoj el diversaj sciencaj verkoj kaj paroladoj, la multaj sentencoj de Darwin, Haeckel, Bolsche, de famaj verkistoj. .."

## Pri Religio, Neutraleco, Kulturo en Esperantujo

"Mi .. konsterniĝas pri la grado de religiumado en la Esperantomovado. Tiuj agadoj kompreneble antaŭenigas nian karan lingvon, sed havas laŭ mia opinio malpli pozitivajn sekvojn por la entuta socia medio."

"Certe, multaj neutralaj Esperanto-grupoj havas trudatajn religiajn influojn. Nur alta kultura nivelo, raciista, atingos por homo realajn solidarecon kaj liberecon."

"Ankaŭ mi rimarkis ke la esperantistaro glitis en potencon de religio... en Pollando [kaj alie] multaj geesperantistoj vizitis la preĝejon; pola docento instruis kontraŭ ateismo."

"En Brazilo multaj pensas ke Esperanto estas ia mistika religia afero."

"La spiritistoj [en Brazilo] dissemas la ideon, ke Esperanto estas spirita afero, tiel malhelpante la ĝeneralan disvastigon."

"En balta kongreso .. partoprenis plejparte katolikanoj. Okazis diservo. Neniu provis trudi religion. Malgraŭ tio religia influo estis sentebla."

"Mi partoprenis en hispana kongreso .. kies programo enhavis diservon. Kiuj ne ĉeestis en la meso, surstrate devis atendi ĉe la kongresejo ĉar la pordo restis fermita. Do toleremo havas nur unu flankon: NI."

"La etoso reganta plurfoje niajn Esperanto-aranĝojn, kiu ne nur estas naŭza .. sed ĝi vere venenigas la eventuale pozitivajn spertojn de la freŝbakitaj movadanoj kaj ne malofte eĉ kabeigas tro multajn, certe valorajn homojn, kiuj seniluziiĝas pri Lingvo Internacia entute. Mi mem spertis multfoje mokojn en la neesperantistaj medioj pro la aparteno al iu 'stranga', konspira, kvazaŭ sekto .. almenaŭ parte ni mem estas kulpaj je tiu malfavora bildo .. mi sentas min donkiĥoto, kiam mi observas samideanojn vanigantajn mian penon [je defendo de Esperanto]. Ĵus mi revenis el nia loka Esperanto-ferio, enkadre de kiu okazis katolika diservo en Esperanto. Supozeble, ĉiu partopreninta eksterlandano ricevis plurajn pruvojn, ke en mia lando ne okazas ajna Esperanto renkonto [en Pollando] sen katolika diservo."

Je mia peto pri la pola sinteno pri judoj kaj la trudo de katolikismo al Esperanto-kunvenoj, alia pola samideano klarigis al mi la historion kaj aktualan situacion de la judoj en Pollando. Interalie, li menciis grandan lastatempan intereson de poloj pri juda kulturo, eĉ kvazaŭ "filosemitismo" [t.e. admirado de judoj]. Li donis ankaŭ informojn pri Pola Esperanto-Asocio, aparte ĝian leĝan statuson. Mi citas ĉi tie nur aferojn kiuj rilatas al ATEO.

"Ni polaj Esperantistoj tute ne estas antisemitistoj, kvankam mi ne rajtas aserti, ke antisemitismo jam [malaperis] en Pollando. .. Mi ankoraŭ ne renkontis ĝis nun iun homon, kiu diris al mi, ke li/ŝi estas judo aŭ juddevena... ne ekzistas problemo de iu aparta grupo de judaj esperantistoj en Pollando..."

"Se kelkaj intelektuloj trudas la religian etoson dum la Esperanto-aranĝoj, unuflanke la ekstera publiko opinias nin sektemuloj kaj aliflanke ni donas kialojn ke la ŝtatinstancoj ne favoru nin."

"Ni subtenu niajn estontajn anojn en baraktado kontraŭ la trudado de religio en laŭstatute neŭtralajn Esperanto-asociojn en tiaj formoj, kiaj ŝajnas al ili plej taŭgaj, ĉar nur ili vere konas la lokan situacion. .."

"Vi pravas, ATEO devas esti ne neŭtrala. La neŭtraleco konsentas rajtojn al ĉiuj kredoj kaj religioj, kiuj ankaŭ enhavas politikajn agadojn. Antaŭ 50 jaroj "neŭtraleco" malhelpis demokratulojn dum la Hispana Civila Milito. Ankoraŭ nun, neutraluloj vicas flanke de militistoj kaj faŝistoj."

**Ĉef-Redaktoro**: Oni devas distingi inter la oficiala politika neŭtraleco de Esperanto-asocioj kaj neŭtraleco de Esperantistaro mem kiel socia-kultura grupo. La koncepto de Esperantujo kiel ia "neŭtrale homa" socio estas trompo denuncenda. Estas multaj subtenan-

toj de Reagan-ismo inter Usonaj Esperantistoj, kiujn mi neniam nomos "samideanoj." Ili ŝatus pensi sin neutraluloj, sed ili ja troviĝas en la kampo de reakcio. Ili estas ne internaciistoj, sed nur turistoj.

---

"Same kiel vi, mi opinias ke en la Esperanto-movado ne ekzistas ideologia ekvilibro; almenaŭ formale, laŭ la institucioj, asocioj .. mi supozis male al vi, ke plejmulto de esperantistoj estas ateistoj, homoj racie pensantaj aŭ humanistoj."

**Ĉef-Redaktoro.** Mi neniam tion supozis.

---

"Mi estas tute ĉe via flanko kiam vi diras ke la esperantistoj devas ne miksi religion kun Esperanto. Bedaŭrinde ekzistas multaj kiuj uzas Esperanton kiel amuzilon por semajnfinoj. Ili nomas sin pacistoj sed faras nenion alian ol kanti kaj krokodili. Feliĉe estas ankaŭ tiuj, kiuj ekzercas la lingvon serioze, sed ekzistas malmultaj kiuj memoras ke Zamenhof kreis internacian lingvon por solvi internaciajn problemojn, kiaj: organizi la pacon kaj solvi la ekologiajn problemojn, kiuj same kiel atombombo povos detrui nian teron. Mi amas nian Pilketon, eta en la universo, sed la sola kiun ni havas."

---

Karikaturo "Pastro kun dieto" kiun la katolika eklezio en okcidenta germanio intencis malpermesi per tribunalo.



»Priester-mit-Göttchen-Plakat« der Bunten Liste Freiburg

Dankon al Roland Schnell el Germanio FR.

---


# Sekso kaj Egaleco

## Sendependa Bulteno

## Informoj Pri Virina Agado

Aperas neregule
Abono (4 numeroj)
16 ned. gld. au 15 irk.

Redaktoro: Anna Brennan
Colle Rasto
I-00039 Zagarolo
Italujo

(Ĉi tiu anonco reciprokas anoncon pri ATEO en *Sekso kaj Egaleco*)

## Mia Dio, de Robert Long, en *Algemeen Dagblad* Ĝenerala Ĵurnalo), 01-02-1988) Tradukita de Rejna de Jong, el Nederlando

N.d.l.R.: Daŭrigo de artikolo en ATEISMO #1, paĝoj 8-9; pluaj reagaj ensenditaj leteroj. Rejna de Jong tradukis por ni ankaŭ reagajn leterojn al la artikolo de Robert Long por montri la depriman staton de konscio de granda parto de la nederlanda popolo. Al mi estas tute evidente, ke la tradiciaj kristanoj suferas la mensmalsanon de memfremdiĝo. Ili timas aŭskulti propran konsciencon kaj komprenon, t.e. la "interna dio" de Long; ili povas nur fetiĉisme surpreni artefaritajn valorojn kiuj trudiĝas autoritatece de ekstero. Eble al ili mankas honesta konscienco. Tiaj homoj estas vere danĝeraj.

6. "Ne estante vere kristana, mi opinias tion kion skribis R.L. en AD subnivela. Cetere mi ne komprenas, ke multlegata ĵurnalo kiel AD ĉiusemajne publikigas senvalorajn rakontojn de R.L. Se AD por mi ne estus nemalhavebla ĵurnalo, mi jam antaŭlonge ĉesus mian abonon."

7. "Kial EO pere de la radio havas la rajton provi konvinki nin pri ĉia sensenca religia babilado kaj R.L. ne havu la rajton konvinki nin pri siaj ideoj rilate al dio? Kiam mi aŭdas EO mi malŝaltas la radion. Se la adeptoj de EO faras la samon pri R.L., ĉi tiu problemo jam estos solvita. Robert, via disko estas belega."

8. "La negativaj reagoj al la artikolo 'Mia Dio' de R.L. ree montras evidente, ke la tiel nomataj kredantoj postulas *ekskluzive por si la rajton pri libera opiniesprimo.* Ne-kredantojn, kiuj esprimas sian honestan, personan opinion, ili tuj provas silentigi. Urĝas, ke kredantoj lernu kompreni, ke multaj havas tute alian bildon pri Dio kaj la mondo ol ili, kaj ke *ĉiu* havas la rajton vortigi tion. Daŭrigu sammaniere Robert; kun plena aprobo mi legis vian artikolon."

9. "Viaj komentoj pri la eldiroj de sinjoro Dolman* rilate al la kredantoj de nia popolo estas ekzemple 'sendependaj.' Sed kial do vi permesas al sinjoro Long vomi sian blasfeman lingvaĵon pere de via ĵurnalo? La Biblio nin avertas pri tia fanfaronado, kiel ekz. en Jesaja 14: 'Mi supreniros sur la altaĵon de la nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo.' Nu, tion do faras sinjoro Long."

(*S-ro Dolman estas la prezidanto de la dua ĉambro de la parlamento. Li publike diris kelkajn aferojn, kiuj ne plaĉis al la kredantoj, i.a. ke la Artikoloj de la kredo por li estas sensencaĵo.)

10. "Kian abomenan pruvon pri fierego montras la kolereksplodo de R.L., en kiu li ne konas alian Dion ol la karikaturon kiun li sentas 'en li.' Long distancigas sin de Kristana eduksfero, kiu petis de li nur submetiĝon al sia Kreinto kaj reveno al Li. Sed sin klini estas fremda al L. Cetere kial AD sin malaltigas, havigante spacon por kolumno al ĉi tiu viro?"

Diskuto estas fermita [noto de la redakcio de la ĵurnalo].

**Trovi dion per religio estas simila al blindulo en nigra ĉambro, kiu serĉas nigran katon kiu ne estas tie, kaj li trovis ĝin!**

## Letero de Humanisto, de Andreo Ŝalamon, el Israelo

N.d.l.R.: Daŭrigo de artikolo en ATEISMO #1, paĝojn 18-19. Ni ne ricevis ĉi tiun parton de la teksto kiam ni eldonis la numeron.

Do, ankaŭ la socio ne povas ekzisti en la kadro konstruita antaŭ mil jaroj.

Ni konsideras la *homaron* kiel ne disigeblan unuon. Por ni ĉiu homo estas nia frato senkonsidere de lia (ŝia) haŭtkoloro, fizikaj ecoj, au de loko kie li loĝas aŭ de lando ke kiu li devenas aŭ de lingvo kiun li (ŝi) parolas. Por ni la decida faktoro por homo estas lia morala konduto rilate alian homon kaj lia (ŝia) akcepto de tuthomaj reguloj. Laŭ la instruo de Jezuo: Kiu sekvas mian vorton tiu estas mia frato. -- Do ni plej energie rifuzas ĉiujn faŝistajn aŭ rasismajn ideologiojn.

Ni kontraŭas ĉiujn privilegiojn kiuj estas ligitaj kun deveno aŭ kun la ekonomia forto de la opulo.

Ni batalas por la esenco de la instruoj troveblaj en la Biblio (aŭ en aliaj similaj libroj) kaj ne por la efektivigo de nuraj vortoj.

Por realigi suprajn ideojn, ni energie propagandas la enkondukon de unu tuthomara lingvo, de unu tuthomara alfabeto, de unu ortografio, de unu sole valora kalendaro kaj de unu tutmonda monunuo. -- Ĉio supre menciita servas por plisimpligi la vivon de la larĝaj homaj amasoj. Por ke la klereco kaj la sano ne estu privilegioj de riĉuloj sed ili estu propraĵo de la tuta homaro. Tial ni varme kaj forte propogandas la tutmondan enkondukon de la internacia lingvo Esperanto, kio ebligos al la homaro simplan, facilan interkomprenigon sen privilegioj.

Ni ne konas la nociojn: sankto, kredo, tradicio.

Ni kontrauas la blindan obeon al ĉiu ajn deklaro. Ni postulas ke la plej decida faktoro por juĝi homajn aferojn estu la homaj konscienco kaj konscio.

Ni estas konsciaj pri tio, ke tiu batalo estos treege malfacila, turmenta, ligita kun multaj seniluziiĝoj kaj perdoj. -- Sed tio estas la enhavo, la celo kaj la valoro de nia vivo.

---

***Dio-Genezo: La Maniero Kiel Dio Estis Inventita,*** de Maximilien Trenner. 33 paĝoj. Enhavo: (1) antauparolo, (2) rememorigo de Antropogenezo, (3) eta kalkulo, (4) la maniero kiel Dio estis inventita, (5) historio de Koraĥ, Sodomo kaj Gomoro, (7) Jeriĥo, (8) unu malvenko, (9) morto de Moseo, (10) diversaj profetoj kaj iliaj sortoj, (11) hodiaŭaj tendencoj, (12) kion fari, (13) difino de tempo, (14) difino de vivo, (15) konkludo, (16) mallongigoj kaj bibliografio. Havebla en au Esperanto aŭ la franca lingvo je 40 FF de Lina Trenner Gabrielli, 166 avenue Daumesnil, F-75012 Paris 12, Francio.

El recenzo de ***Pensoj kaj Protestoj,*** kolekto de senrioj (japana poeziformo) de Feiko Munniksma (je 20 FF, Eldonejo Perspektivo, Norregardsvej 91 DK 2610 Rodovre). En ***Laŭte***! (#56 [74], septembro/oktobro 1984, p. 12) aperis la jena kiu ne troviĝas en la libro:

> Papo kaj mito
> kaj banko. Por kredemul'
> sankta spirito.

* * * * *

"La homo al kiu necesas Sinjoro Dio, estas besto. Tuj kiam li fariĝas homo, li ne plu bezonas Sinjoron." - Johann Gottfried Herder [sendita de Ernst Diedrich, el Germana DR].

# Statuto
de la
# Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO)

Formale adoptita fare de la ĉeestintoj de la fakgrupo dum generala kunsido tiukaŭze kunvokitaj, je 1988-07-29 en Roterdamo, Nederlando.

1. **La oficiala nomo** de la Fakgrupo estas Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo; mallonge, ATEO.

2. **La agadtereno de ATEO** estas ĉiuj landoj, kie vivas Ateistoj kaj Esperantistoj.

3. **La Fakgrupo konsistas** el individuaj personoj kiuj konas la lingvon-Esperanto. La sidejo de ATEO estas en San Francisko, Kalifornia, Usono. Sed translokigo de la sidejo eblos, se necese pro ŝanĝo en la ĉirkonstancoj de la Fakgrupo.

4. **La celoj de ATEO estas:**
   - 4.1 Kunligi Esperantistajn Ateistojn kaj liberpensulojn.
   - 4.2 Disvastigi Esperanton inter Ateistoj.
   - 4.3 Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
   - 4.4 Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe ne-religiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
   - 4.5 Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.
   - 4.6 Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatiajn sociajn problemojn.
   - 4.7 Malkateni la mensojn!

5. **Membroj de ATEO estas:**
   - 5.1 Ĉiu individua persono kiu subtenas kaj akceptas la celojn de ATEO.
   - 5.2 Ĉiu individua persono kiu pagas la jaran kotizon, kiun la membroj decidas ĉe la jarkunveno.

6. **Rajtoj de la membroj:**
   - 6.1 Ĉiu membro havas rajton partopreni en la jarkunveno ĉe la Kongreso de UEA.
   - 6.2 Ĉiu membro havas rajton ricevi la eldonaĵojn de ATEO.
   - 6.3 Ĉiu membro havas rajton de vocdono ĉe la jarkunveno kiam vocdonado okazos.

7. **La Estraro**
   - 7.1 La Estraro konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, kaj Kasisto-Sekretario.
   - 7.2 Se la Prezidanto ne povas ĉeesti la jarkunvenon, la Vicprezidanto akceptos la rolon kaj prezidos.

7.3 La Kasisto-Sekretario prizorgas la financajn aferojn kaj skribadajn aferojn de ATEO.
7.4 La membreco ĉe la jarkunveno de ATEO decidos pri la elekto de la anoj de la estraro.
7.5 La estraro per eldonajoj informos la membrecon pri la agoj de ATEO kaj pri kunvenoj, k.t.p.

**8. Generalaj decidoj**

8.1 Generalaj kunvenoj de la membroj okazu principe unufoje dum la jaro, prefere en la kadro de Universala Kongreso. La generalaj kunvenoj estas okazoj ne nur por doni aprobon al la jarraporto kaj decidi organizajn aferojn, sed ankaŭ por aŭdi kaj diskuti aferojn de individuaj membroj.
8.2 ATEO favoras la organizon de UEA kaj deziras kunlabori en ĉiuj kategorioj kun Universala Esperanto-Asocio.
8.3 En la neceso dissolvi ATEO-n, la havajo de ATEO transiros al Universala Esperanto-Asocio.

---

## Resumo de Adresaro je Januaro, 1989

### Personaj en Regiona Ordo

**Orienta Eŭropo**

| | |
|---|---|
| 9 | Bulgario |
| 9 | Ĉeĥoslovakio |
| 11 | Germana DR |
| 8 | Hungario |
| 16 | Pollando |
| 12 | Sovetio |
| 65 | Sumo |

**Okcidenta Eŭropo**

| | |
|---|---|
| 3 | Aŭstrio |
| 5 | Belgio |
| 11 | Britio |
| 1 | Danlando |
| 12 | Francio |
| 7 | FR Germanio |
| 1 | Grekio |
| 10 | Hispanio |
| 4 | Italio |
| 3 | Jugoslavio |
| 9 | Nederlando |
| 1 | Portugalio |
| 3 | Svedio |
| 2 | Svislando |
| 72 | Sumo |

**Meza Oriento**

| | |
|---|---|
| 6 | Israelo |

**Afriko**

| | |
|---|---|
| 1 | Maŭricio |
| 1 | Tanzanio |

**Azio**

| | |
|---|---|
| 1 | Aŭstralio |
| 3 | Ĉinio, P.R. |
| 4 | Japanio |
| 1 | Nov-Zelando |
| 9 | Sumo |

**Norda Ameriko**

| | |
|---|---|
| 1 | Kanado |
| 28 | Usono |
| 29 | Sumo |

**Suda Ameriko**

| | |
|---|---|
| 1 | Argentino |
| 5 | Brazilo |
| 1 | Ĉilio |
| 1 | Venezuelo |
| 8 | Sumo |

**191 Sumo en 33 landoj**

### Gazetoj en Landoj

**Orienta Eŭropo**

| | |
|---|---|
| 2 | Bulgario |
| 2 | Hungario |
| 4 | Sumo |

**Okcidenta Eŭropo**

| | |
|---|---|
| 2 | Aŭstrio |
| 1 | Belgio |
| 2 | Britio |
| 5 | Francio |
| 1 | FR Germanio |
| 1 | Italio |
| 2 | Nederlando |
| 2 | Svislando |
| 16 | Sumo |

**Azio**

| | |
|---|---|
| 1 | Ĉinio |
| 4 | Japanio |
| 5 | Sumo |

**25 Sumo en 12 landoj**

## Metodoj pri Jarpago de Abonkosto por 1989

1. **Pere de $8.00 US rekte al ATEO en Usono.** Se vi eblas, bonvolu pagi pere de ĉeko aŭ poŝtmandato, pagenda al "ATEO", kaj poŝtekspedas ĝin al: John B. Massen, 855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA. Se vi ne eblas pagi en tia maniero, do pagu al UEA, se vi eblas.

2. **Pere de UEA.** ATEO aranĝas kun UEA por ĝia abonservo, por kiu ATEO pagos al UEA procenton de la abonkosto. **Se vi povas pagi pere de UEA, jen instrukcio: pagu rekte al UEA la sumon de 16 guldenoj aŭ ekvivalento en aliaj formoj, <u>pagebla al UEA</u>, por ATEO konto "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

2.1 Se vi havas poŝtbankan konton, pagu prefere rekte en la nederlandan poŝtbankkonton de UEA, numero 378964. Se ne,...

2.2 Vi povas pagi per internacia poŝtmandato. Sendu poŝtmandaton al UEA, Niewe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam ... NE al banko aŭ poŝtbanko.

2.3 Ankaŭ eblas pagi rekte en la bankkonton de UEA ĉe Bank Mees & Hope, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam, numero 25.52.89.804.

2.4 Aliaj rimedoj estas, ekzemple:

2.41 Ĉekoj aŭ eŭroĉekoj (ne forgesu meti la numeron de via karto sur la dorsan flankon de eŭroĉeko).

2.42 Monbiletoj (ne nepre devas esti guldenaj, dolaraj au forintaj - oni povas sendi per aliaj valutoj ekvivalentan sumon).

2.43 Internaciaj respondkuponoj. Valida internacia respondkupono valoras unu guldenon. Tia kupono validas nur se la stampo de la emisiinta poŝtoficejo estas sur la maldekstra parto; la dekstra parto estas por la akceptanta poŝtoficejo.

**Kiel ajn vi pagos, memoru ke, SE UEA simple ricevas monon - SEN iu mesaĝo, ĉu kun la pago aŭ ĉu per aparta letero - ili NE povos scii ke temas pri abono al "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

3. **NE pagpovaj landoj.** Ni ne povas aranĝi metodon por pago. Tamen, ni sendos ATEISMO-n al ĉiuj kiuj petas ĝin.

---

**Se "P89" aperas post via nomo sur la koverto en kiu ĉi tiu numero alvenis, la Sekretario-Kasisto ricevis vian pagon por 1989.**

**Aliaj: BONVOLU PAGI LA ABONKOSTON TUJ, SE EBLE.**

---

## Peranto por Britio

Abonantoj en Britio povas pagi al Mark Palmer, kiu afable proponis servi kiel peranto por Britio. Bonvolu sendi pagon al: Mark Palmer, 28 Westfield Road, Caversham, Reading RG4 8HH, Great Britain.

**Ni Bezonas Perantojn de Aliaj Landoj**
**Bonvolu Proponi Vin Mem al Sekretario-Kasisto**

## La ESTRARO de ATEO
### Ateista Tutmonda Esperantisto-Organizo

**Ralph Dumain**, Prezidanto, Ĉef-Redaktoro, kaj Kun-Fondinto
1629 Columbia Road NW, Apt. 615, Washington, DC 20009, USA
Tel: 202 - 332-0589

**Minerva Massen**, Vic-Prezidanto, Kun-Redaktoro kaj Kun-Fondinto
855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA
Tel: 415 - 668-7605

**John B. Massen**, Sekretario-Kasisto kaj Eldonisto
(Vidu supre por Minerva.)

**Manuskriptoj**

Ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en multaj landoj.

Bonvolu sendi manuskriptojn al Minerva Massen, preferinde tajpitajn kaj kun duoblaj-spacitaj linioj. Konservu ĉe vi kopion de via manuskripto.

Aŭtoroj rajtas uzi pseŭdonimojn. Ni senhezite akceptos tradukojn el klasikaj aŭtoroj kie ne ekzistas kopirajta problemo. Pri kopirajthava materialo, provu gajni permeson de la aŭtoro aŭ eldonisto kaj sendu al ni kopion de la skribita permeso.

Ni NE akceptos porreligian propagandon por nia revuo.

**Korespondado kaj Informpetoj**

Vi rajtas kontakti iun ajn estraranon. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekutadon pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn apartajn aranĝojn por vi. Se vi skribas permane, bonvolu skribe klare, aparte vian adreson.